



8-6-1974

CGC Nº

00406 504/1000-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

BRASÍLIA – DISTRITO FEDERAL

Sede: Edifício Jockey Clube, sala 103

Setor Comercial Sul

REDAÇÃO E PRESIDÊNCIA

Rua Galeão Carvalho, 31 – AP. 73

Telefone 4-8033

11.100 – Santos (SP)

SECRETARIA

Caixa Postal 07 – 1182

Telefone 226-1298

70.000 – Brasília (DF)

(Correspondência para a redação: endereço acima)

SETEMBRO/OUTUBRO DE 1981

ÓRGÃO OFICIAL DO BKE

BOLETIM Nº 64

II-A KONGRESO DE BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

Okazos la evento de la 31-a de oktobro ĝis la 2-a de novembro, 1981, en la urbo São Paulo (SP).

En la ejo de Liceu Coração de Jesus, Alameda Dino Bueno, 383 - (proksime de la aŭtobusa stacidomo), do, la alvenon faciligas la prokmiseo de la kongresejo.

La amasa ĉeesto de la geesperantistoj estas tre grava, ĉar la elektota direktoraro de BKE respondecas dum tri jaroj pri la daŭriga disvolviĝo kaj bonaj atingoj de la Brazila Konsilantaro de Esperanto.

Estas evidente, ke en la venonta jaro la nova prezidanto kaj la de li elektitaj kunlaborantoj daŭrigos la bone komencitan administradon, kiu ebligis al ni okazigi la grandiozan 66-an U.K'on en Brazilo.

Komenciĝas nova erao en la brazila Esperanto-movado. Ni esperas, ke la unuiĝo kaj kunlaborado de la esperantaj organizaĵoj en la estonteco estu daŭre pli kaj pli forta.

Estas nepre necese eluzi la favorajn kondiĉojn, kiuj neniam estis tiel bonaj kiel nun; gravas, ke ĉiuj klopodu kunlabori por la pli bona sukceso.

La forta kandidato por la venontaj 3 jaroj estas s-ano Carlos Augusto Siqueira da Cunha, la ĝis nuna financa direktoro de BKE kaj kasisto de la L.K.K. por la 66-a UK.

Li jam elektis diu kunlaborantojn, kiuj

REDAÇÃO: MARIA ALMADA

konfirmis sian ĉeeston en la direktoraro, ili estas S-roj Nelson Pereira de Souza kaj Carlos Dorini Ramos. La aliaj ankoraŭ ne konfirmis la akcepton de la direktado de BKE.

Se ĉiuj kunlaboros la movado kreskos.

Ĝis nun aliĝis al la II-a kongreso la jenaj gesamideanoj: Gilberto da Silva Velho, Ivon Barbosa, Tiyoe Tsuyama, Helena Moré, Maria Encarnação Moreno, Sebastião Duarte da Silva, Antonio João Fraga Padilha, Edson Levi Resta Amorim, José Martins Coelho, Genildo Martins Coelho, Beatriz Coelho, Maria Mercedes E. R. Coelho, Oswaldo Pires de Holanda, Rosalvo M. de Holanda, Helmut Schenk, Wilma Martins Schenk, Lourenço Sogabe, Eva Alves Faria, João Masiero, Fanny Dupré, Paulo Sergio L. M. Barreto, Carlos S. da Cunha, Manoel Blaz Garcia, Eluizio Bueno Rodrigues, Angela B. de Anonio Rodrigues, Armando Gonsales Roman, Espedita de Castro Feitosa, Braz Cosenza, Cedilha Neto, Lair Alves Moreira, Fukumi Kuwada, Valquiria Camargo, José Bastos, Igor Colonna Valevski, Katia Colonna Valevski, Jorge Shigaef, Cesar Rodrigues Gomes, Percilva Baptista Gomes, Allan Kardec Afonso da Costa, Salvador Raymundo, José Dias Pinto, Amédia Dias Pinto, Alvaro Henrique Dias Pinto, Marisa Sadon, José Francisco Marcilio Filho, Wilmar Santos, Ruth

Alves Medeiros, Maria Antonia Ladalarde, Hersila Valverde, Nelson Pereira de Souza, Joel Maciel Soares, Johano Puigvert, Eugenio Colono Vakevski, Humberto Tedesco, Luiz Augusto Sadon.

HOTÉIS INTERESSANTES:

(Para telefonemas: Código 011) - Tel. no apto.: "b"; Ar cond.: "a"; TV - "d"; só café pela manhã.

1 - HOTEL OPALA - Av. Duque de Caxias, 860 - Tel.: 221-0665 (b) - Apart. p/ 1 pessoa - Cr\$ 900,00 e Cr\$ 1.000,00; para 2 pessoas: Cr\$ 1.300,00; para 3 pessoas Cr\$ 1.800,00.

2 - HOTEL MINHO - Av. Duque de Caxias, 888 - Tel.: 222-7633 (b) - Apart. p/ 2 pessoas - Cr\$ 1.500,00; para 3 pessoas Cr\$ 2.000,00.

3 - HOTEL KING - Rua Conselheiro Nébias, 142 - Tel.: 220-6811 (b - d) - Apart. p/1 pessoa Cr\$ 2.400,00; para 2 pessoas Cr\$ 2.700,00 (standard) - 2.900,00 (luxo) - abat. 10%.

4 - HOTEL IRRADIAÇÃO - Av. Ipiranga, 1190 - Tel.: 229-2411 (b - c) - Apart. para 1 pessoa Cr\$ 1.700,00 (standard); Cr\$ 2.040,00 (luxo); 2 pessoas Cr\$... 2.900,00.

5 - HOTEL NOBILIS - Rua Santa Efigênia, 72 - Tel.: 229-5155 (a-b-c-d) - Apto. p/1 pessoa Cr\$ 2.780,00 (standard); Cr\$ 3.295,00; Apto para 2 pessoas - Cr\$ 3.575,00 (standard); 3.895,00 (luxo).

6 - HOTEL ROJAS - Av. São João, 1399 - Tel.: 221-7333 (b-c-d) Apto. para 1 pessoa Cr\$ 1.995,00; apto para 2 pessoas Cr\$ 3.300,00.

7 - HOTEL COMODORO - Av. Duque de Caxias, 525 - Tel.: 220-1211. Apto. para 1 pessoa Cr\$ 3.000,00 (standard); Cr\$ 3.500,00 (luxo) - (a-b-c-d) Apto. para 2 pessoas Cr\$ 3.500,00 (standard); Cr\$ 3.900,00 (luxo); Apto. simples para 1 pessoa Cr\$ 2.500,00; para 2 pessoas Cr\$ 3.000,00.

8 - HOTEL SÃO PAULO CENTER - Viaduto Sta. Efigênia, 40 - Tel.: 228-6033 (a-b-c-d) - Apto. para 1 pessoa Cr\$... 3.950,00; para 2 pessoas Cr\$ 4.450,00.

9 - HOTEL NORMANDIE - Av. Ipiranga, 1187 - Tel.: 228-5766 (a-b-c-d) - Apto. para 1 pessoa Cr\$ 3.453,00; para 2 pessoas Cr\$ 4.887,00 (standard); Cr\$... 5.645,00 (suite).

Próximos do local do Congresso: Hotéis 1, 2, 3, 4, 5 e 9 pela ordem acima.

Os 5 primeiros não crescem 10%. O Comodoro concede abatimento, dependendo do número de pessoas. O hotel Nobilis para um grupo de 15 pessoas ou mais cobra Cr\$ 1.490,00, sem o acréscimo de 10% (por pessoa).

ORATORA KONKURSO

Kadre de la 2-a Kongreso de BKE okazos Oratora Konkurso, kiun ĉiu partoprenonto povas konkuri.

La temo estas Zamenhof-centjara Esperanto. Ka monpremion oferdonos la nuna prezidanto de BKE, S-ro Francisco de Souza Almada, por esti dividota jene:

1-a - Cr\$ 2.000,00 por la plej bona laboro, konciza kaj ne tro longa;

2-a - Cr\$ 1.500,00 por la plej bona prononco;

3-a - Cr\$ 1.000,00 por la plej mallonga sed trafa prezendado; kaj

4-a Cr\$ 500,00 por la plej juna partoprenanto de la konkurantoj, laŭ La laboro prezentota.

Omaĝe al la TAGO DE LA INTERNACIA LINGVO ESPERANTO (15-a de Decembro), kreita de la Leĝo 505, de 18/11/74, proponita de la deputito Solon Borges dos Reis, la Esperanto-Asocio de San-Paŭlo promocias konkurson pri pensoj rilate Esperanton, kies regularo estas la jenaj:

SKIZO DE LA REGULARO PRI LA KONKURSO RILATE PENSOJN PRI ESPERANTO

1) Estas permesate al ĉiuj studentoj de superaj kursoj ĝin partopreni;

2) Verkita en la portugala lingvo la penso devas havi nur 5 liniojn;

3) Ĉiu kandidato povas prezenti nur du pensojn;

4) La kandidato devas traduki korekte la frazon: - "Esperanto estas la lingvo

internacia kreita de D-ro Zamenhof, jam parolata en la tuta mondo".

5) La laboroj devas esti tajpitaj sur papero "sulfito" - granda ofica;

6) La kandidato subskribu la laboron per pseŭdonimo, metante en koverton la klarigojn pri sia nomo, adreso, aĝo, kaj nomo de sia lernejo;

7) Tiuj laboroj estos ricevitaj de Esperanto-Asocio de S. Paulo ĝis 27/XI/81, La dato de la poŝmarko ne validos;

8) La kovertoj de la konkurantoj devas havi la adreson: "Concurso de Pensamentos sobre o Esperanto - Associação Paulista de Esperanto, Rua Faustolo, 10, 124 - 05.041 - São Paulo (SP);

9) La premio estas por la plej bela penso: Cr\$ 5.000,00 kaj diplomo;

10) La kandidato sur 2-a loko ricevos tri librojn, medajlon kaj diplomon;

11) La klasifitaj sur 3-a, 4-a kaj 5-a lokoj ricevos 1 libron, medajlon kaj diplomon;

12) La kandidatoj post la 6-a ĝis la 15-a loko ricevos diplomon;

13) La rezultatoj de tiu konkurso estos publikigitaj post la 5-a/XII/81;

14) La livero de la premioj okazos en la 15-a da decembro 1981.

VIZITO DE OOMOTANOJ

Vizitis nin la OOMOTANOJ, kiuj partoprenis la 66-an UK on en Brazilio, temas pri la S-roj Yasuharu Fujinoto kaj Hiroyski Hayama, kiuj invitis nin partopreni "Japanan Vesperon", kiun la "Oomota Esperantista Karavano" okazigis en Santos, esperante, ke tiu vizito povas pli "profunde amikiĝi pere de Esperanto, kiu ligas la homojn en la mondo, dezirante grandan prosperon al Esperanto en nia lando".

ALVOKO AL ESPERANTISTAJ TRADUKISTOJ

Multaj esperantistoj agas en la kadro de la internaciaj fakaj organizaĵoj. Ankaŭ esperantistaj tradukistoj, tradukantoj, devus grupiĝi por kunordigi la individuajn laborojn; organizi internaciajn kongresojn

kaj seminariojn, en kunlaboro kun UEA kaj FIT (Internacia Federacio de Tradukistoj), publikigi artikolojn kaj verkojn pri la tradukarto, interŝangi spertojn pri la tradukado de beletraĵ, sciencaj, popularsciencaj, teknikaj, publicistaj kaj ĉiufakaj tekstoj.

Por fondi internacian asocion de esperantistaj tradukistoj mi petas rimarkojn, proponojn, opiniojn, projekton de la statuto kaj aliajn materialojn. Ĉiujn kontribuojn bonvolu sendi al jena adreso: — S-ro Zibigniew Czupkalo, PL 24-220 Niedrzwica Duza, Pollando.

NI FONDU ASOCION DE HANDIKAPITAJ ESPERANTISTOJ

Unuigintaj Naciojn proklamis la jaron 1981 - "Jaro de Handikapitoj". Ĉar inter esperantistoj ekzistas pluraj tiaj, mi proponas fondon de Internacia Asocio de Handikapitaj Esperantistoj, kiu havos celon: "Helpi unu al la alia". Pli detalajn informojn oni povas ricevi de S-ro Dušan Adnadj, Školska ul. 25 - 56227 - Borovo, Jugoslavija, aldonante respondkuponon. Kiu interesiĝos volu sin turni al la supra adreso.

NOVA LIBREJO EN BELO HORIZONTE

Nia samideano Alan Kardek Afonso da Costa informis nin, ke li fondis librejon en kiu li bone vendas esperantajn verkojn. En la sama ejo li okazigas kursojn pri la internacia lingvo ĉiulunde.

Li diris, ke BSF ĝis la fino de la jaro lanĉos du librojn: "Feliĉaj la Simplaj" kaj "Kialo de la Vivo". Lia adreso estas: Allan Kardek A. Costa - Caixa Postal nº 507 CEP 30.000 - BELO HORIZONTE (MG).

MONO RICEVITA POR LA BULTENO

Ni ricevis de la jenaj gesamideanoj, kaj dankas:

Helmut Schenk	1.000,00
Lanoy Dorin	500,00
Alvaro Rabelo	500,00
Claudio Zimmermann	300,00

Elvira Fontes	500,00
Salvador Raymundo	500,00
Esperanto-Asocio de S.Paulo	500,00
Ernani Dias Corrêia	1.000,00
Hersila Valverde	200,00
Axel von Blottnitz	1.000,00
Oto Vaske (al Brazilio)	82,00
Joel Maciel Soares	2.000,00

GAZETOJ RICEVITAJ

"ACIG" (revuo), Reformador, Sei, A Gazeta Esportiva, The Oomoto School, BEJO, "Momenton", Correio Brasiliense, Svsa Fervojisto, "O Ponto", Brazila Katoliko, Impacto, SEK, O Lider, A Caminho da Luz, ZET (da Jugoslavia), Gazeta da Bahia, Correio Fraternal do ABC, Jornal de Guarulhos, Tribuna Guarulhense, Diário de Guarulhos.

DIVERSAĴOJ

MUNDO DE DOIDOS E MALUCOS

Manoel Borges dos Santos

*Neste mundo de doidos e malucos
de espingardas e trabucos
violência e ambição . . .*

*A vida transcorrendo como um rio,
como um córrego vazio,
vazio - o coração! . . .*

*Os belos ideais da mocidade
de paz e fraternidade,
de esperança e amor,*

*transformam-se em corrente fugidia
mais distante da harmonia
e mais perto da dor! . . .*

*Quisera um planeta imaginário,
num deserto solitário,
os meus dias acabar . . .*

*Bem longe das torpesas deste mundo
que de tédio tão profundo,
só me faz repugnar! . . .*

*Mas ninguém vai fugir a seu destino
de prazer ou desatino,
alegria ou dissabor! . . .*

*Pois a vida é um mosaico colorido
caprichoso e divertido,
irônico e enganador! . . .*

*Onde fica o Paraíso da Esperança -
mundo de eterna lembrança,*

de ontem, hoje e amanhã? . . .

*"Em que mundo, em que estrela é
que se esconde? "*

*Oh! vamos! ninguém responde?
que é da Eva, que é da maçã?*

BAMEK

La Barra Mansa Esperanto-Klubo ek de ĝia fondiĝo senhalte progresas. La familio Deslandes diligente agadas tie.

La gazeto loka "O Líder", kies kunlaboranto estas s-ino Denise Deslandes, regule aperigas artikolojn pri Esperanto en nia lando kaj ekster ĝi. La klubo troviĝas sur la Avenida Joaquim Leite, 465, conj. 506.

BAMEK renovigis sian direktoraron kaj nun la prezidanto estas D-ro Wilson Deslandes; vicprezidanto Idé de Oliveira Ebeling; 1-a Sekretario Denise A. Deslandes; 2-a sekretario Fortunata Mattazzo; kasisto Yara da Cruz Arneiro kaj bibliotekisto Elzo Gonçalves de Oliveira. La Kontrola Komisiono konsistiĝas el tri membroj: - Prezidanto Francisco Nogueira kaj la anoj estas Tobias Ferreira kaj João Antonio da Rocha. La klubo posedas bonan bibliotekon kaj konstante organizas kursojn.

La geedzoj Deslandes elstarigis dum la 66-a UK pro ilia sindona helpado al la LKK. Ni deziras daŭran prosperon al la nova elektita direktoraro.

VOLTA REDONDA (RJ)

La spiritisma periodaĵo "SEI" aperigas interesan artikolon de nia vicprezidanto, D-ro Alberto Flores, el ĉi tiu urbo.

S-ro Flores en sia artikolo priskribis interesan renkontiĝon kun alia nekonata esperantisto de Germanio. Li elstarigas la valoron de la internacia lingvo kaj bone propagandas en neesperantistaj medioj. Gratulon!

SALVADOR (BA)

La Esperanto-Societo de Salvador ĉiam bonege agadis kaj daŭrigas sian laboron poresperantan en tiu urbo.

Nia amikino Vivaldina Caymmi, la

populara Vivi, estis malsana kaj tamen iris al Brazilio por ĉeesti la 66-an UK'on. Si nuntempe pli bone fartas kaj reaktiviĝis por la bono de nia movado.

La juna s-ano Sergio Luiz S. Santos, nia kunlaboranto el Salvador, informas nin, ke post la 66-a UK, en tiu urbo kaj ĝia ĉirkaŭaĵo la intereso por la internacia lingvo estas granda.

En Salvador ekzistas 19 geinstruistoj, kiuj gvidas Esperanto-kursojn al 303 ĝe-lernantoj. Lastatempe aperis novaj ĝeinstruistoj, helpantoj al Vivi kaj al samideano Saraiva (du grandaj esperantistaj fortoj en la urbo). La novaj elementoj estas Marcelo Rocha, Romilson Mota kaj Elvira Oliveira.

S-ano Sergio Luiz S. Santos, vicprezidanto de nia BKE, nuntempe studas kaj la 21-an de decembro li diplomiĝos. Ni deziras sukceson kaj prosperon al nia juna batalanto.

MOGI DAS CRUZES (SP)

La redakcion de nia Informa Bul-teno en Santos (SP) vizitis Sam-ino Dinah Carneiro da Silva, el tiu urbo, kune kun sia amikino, s-ino Martha kaj nepeto Irajá, kiu multe ĝojigis nin.

S-ino Dinah estas edzino de nia vicprezidanto Prof-ro Euclides Carneiro da Silva, kiu antaŭ la 66-a UK eldonigis tre bonan libron pri la kunmetitaj verboj kun la prefikso "UM". Ĝin oni povas havigi ĉe li mem, laŭ lia adreso: Rua Capitão Paulo Freire, 366 - CEP 08.700 - Mogi das Cruzes (SP).

CAMPINAS (SP)

En ĉi urbo lastatempe vigliĝas la Esperanto-movado. La juna João Manoel Aguilera Jor. diligente disvastigas Esperanton inter la ĝestudentojn.

Iam en tiu urbo estis bona movado; tie aperis la unua gazeto pri Esperanto la "Sudastelaro", kiun dum longa tempo redaktis la veterano Oscar Hoff.

Poste la movado stagnis, sed la juna Aguilera (lerninto de la konata instru-

to, Prof-ro João Padilha el Bauru revigli-
gis ĝin. La junuloj senpage instruas la internacian lingvon kaj ni fidus je ilia suk-
ceso. Gratulon laŭ antaŭen!

VOTUPORANGA (SP)

La "Diário de Votuporanga" aperigis artikolon pri Esperanto kaj pri tieaj kur-
soj. La urbestrejo en sia "Departamento de Educação, Cultura e Esportes" decidis enkonduki la instruadon de Esperanto. La kurso daŭros unu monaton kaj okazos en EESG-Dr. José Manoel Lobo. Gratu-
lon!

SOROCABA (SP)

La Sorokaba Esperanto-Klubo orga-
nizas konkurson pri Esperanto-redaktado. La temo estas: "Esperanto Lingvo Inter-
nacia", kiun povos partopreni la studen-
toj de 1-a kaj 2-a gradoj. La premioj estos libroj pri Esperanto kaj Cr\$ 2.000,00.

Tiuj premioj estos disdonitaj la 14-an de decembro.

S-ano Eluizio Bueno Rodrigues, membro de la Skolta Societo Klopodas disvastigi la internacian lingvon inter la skoltoj en nia lando.

Estas abonebla la periodaĵo "Skolta Mondo", ĉe s-ro Bueno Rodrigues Cr\$ 200,00. Lia adreso estas: Liga dos Escoteiros do Brasil, Caixa Postal 168 - CEP 18.100 - Sorocaba (SP).

GUARULHOS (SP)

Ke la vicprezidanto de BKE, D-ro Lacorday Andrade serioze laboregas en tiu urbo por nia movado atestas la arti-
koloj en la lokaj gazetoj "Revista André Luiz", "Diário de Guarulhos", "Jornal de Guarulhos", "Tribuna Guarulhense", "ACIG" kaj aliaj informiloj, en kiuj li amplekse propagandas pri Esperanto.

La ĵus kpmencintajn kursojn gvidas la ĝeinstruistoj S-ino Lygia, Arlete kaj D-ro Lacorday.

Krom la gazetoj la loka Radio Boa Nova, de Guarulhos (1450khz) ĉiusabate je la horoj 18:00 ĝis la 18:30. Ni deziras sukceson.

SÃO PAULO (SP)

São Paulo estas la kongresurbo de BKE en la nuna jaro. La organizadon de la 2-a kongreso de la Brazila Konsilantaro de Esperanto direktas la prezidantino de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo, sam-ino Elvira Fontes kune kun la elstaraj gesamideanoj el tiu urbo. La prezidanto de la Organiza Komitato estas s-ro Oswaldo Leite de Moraes, bone konata batalanto por la movado, unu el la fondintoj de la San-Paulo Esperanto-Societo.

La direktoraro de BKE esperas kaj alvokas, amase aperi la geesperantistoj. La Kongreso estos daŭrigo de la poresperanta laboro en nia lando. Ĉies ĉeesto estos por ni tre grava. Aperu kaj tiel vi multe helpas la Organizan Komitaton kaj samtempe nian movadon.

BEJO havos sian renkontiĝon kaj certe ni aranĝos por ili bonan kongreson. La libroservo estas je dispoŝo de ĉiuj. Bonegaj libroj de UEA estas akireblaj dum la 2-a Kongreso de BKE en la sidejo de Esperanto-Asocio de San-Paŭlo.

Nun kiam la jarfino alproksimiĝas, ni klopodu akiri la libron "Esperanto Sem Preconceitos" de Prof-ro D-ro Walter A. Francini. AESP certe kontentigos ĉies deziron pere de siaj ofertoj. Ek al San-Paŭlo! Bonvenon!

GRAVA SCIIGO!

Estas aranĝitaj senpagaj loĝejoj por 50 personoj, sed la interesatoj devas kunporti littukojn!

TROBOJ

José Dias Pinto

Cervantes vivis tro frue;
se post Zamenhof, je Kristo,
Kifoto agus kongrus:
estus li esperantisto.

Lin mem rigardi humure
sen amaro, kum ironi'
facilkore sen torture
povas nur homo, do, ni.

Maria Almada

Printempo

Lazuro kovras florfrondon,
La natur' revadas pie,
Sunbrulo oras la mondon
Ĉar printemp' petolas ĉie
Somero

Sur ĉielo ardas la sun'
Amrevo brulas en koroj.
Okulumas kaŝe la lun'
En amoplenaj noktaj horoj ...

Aŭtuno

Serene parolas la aŭtun
Susuras foliaro dormvola
En malhelon sin kaŝas la sun'
Kaj la nokto silentas tutsola.

Vintro

Kampon kovras kruda frost'
ĝi murdas la herbon kaj florojn
La malvarm' penetras ĝis ost'
Dum amo jejtas niajn korojn.

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

ALIGILO

II-A BRAZILA KONGRESO DE ESPERANTO

De la 31/X-2-a/XI

1981

Mi aliĝas al la II-A Brazila Kongreso de Esperanto, sendante la pagon per.....
..... (ĉeko, poŝt-mandato aŭ pagordo).

Poste..... Cr\$ 500,00

Junuloj ĝis 20 jaraĝa pagas 50%

Nomo

Adreso

Urbo Dato